

Informojn pri Hungario, kiuj aperis en „S-ulo”, represis, menciante la fonton, „Nederlands Studieblad” (julio 1952). K-do de Waard prizorgis tiun enpreson.

La 37-an Kongreson de Universala Esperanto-Asocio en Oslo, Norvegio, partoprenis pli ol 1.400 personoj el 32 landoj. Kongresejo estis la universitato. La urbestro eldiris siajn salutparolojn en esperanto. Parolis ankaŭ la norvega Eduk-ministro. S-ro Lapenna faris la festparoladon, laŭdante la Nordon pro sia laboro por kulturaj celoj. La prelegoj en kadro de Somera Universitato estis parte tro fakecaj. Balo en la urbdomo.

La verko de l' argentina romanisto A. Lopez Luna pri *Zamenhof* aperis nun ankaŭ en itala traduko. La 136-paĝa libro, plaĉe prezentita, tradukita de M. Simondetti, celas varbi novajn amikojn al la esperantismo.

## Radio-kalendaro

**Lunde:** Rabat (Radio Maroko), 18.00-18.30, 482 m; Hilversum (VARA), ĉiun duan lundon, 402 k 188 m. (22.15-22.40).

**Marde:** Bauru (Braz.), 91 m, 240 m K.I. 00.45-01.00; Lille 235 m (7.45-8.00 h.); Bern 48.66, 31.46, 16.87 m (11.55-12.00); Wien 203 m, 25 m, 30 m, 41 m, 48 m (15.00-15.15, ĉiun duan mardon); Bern (17.35-17.40); Gvatemalo 49 m.

**Merkrede:** Graz 417.2 m (ĉiun duan merkr., 15.45-16.00); Romo 25,21 m, 31,35 m, 49,92 m (18.00-18.20); Madrido 225 m, 42,33 m (19.30-20.00); Wien 513 m, 25,46 m, 48,74 m (21.35-21.40).

**Ĵaŭde:** Paris 348 m (8.30-8.45); Bern (11.55-12.00; 17.35-17.40).

**Vendrede:** Romo (kiel merkr.); Hilversum 298 m (22.15-22.30).

**Sabate:** Riodejaneiro 375 m, 30,71 m (8.30-9.00); Hilversum 298 m (22.15-22.20).

bordebuto. — Vi eĉ ne havis monon por manĝi.

— Estu trankvila. Tagmeze ni ricevis teon kaj kolbason. Senpage!

— Tiel afable...

— E-eble... Ĉar sinjoro Flav suferas pro persekutmanio.

— Mi ne komprenas. Tial li donus ekstran manĝon?

— Jes. Li volas, ke la banko absorbu nian vivon; ke li konstante vidu kaj aŭdu nin. Nur pro la konstrua krizo ni ne loĝas en la banko. Sekretoj, vi komprenas... li ne volas, ke ni disportu ilin... Tial li aĉetas niajn favoron kaj tempon per kolbaso.

— Sekretoj?

— Nur komercaj. Pri ili parolu al neniu! Pripensu, ke per babilemo vi riskus mian salajron kun la kolbasporcio kaj tiujn de ĉ. 20 aliaj ĉifonuloj. Por ke vi komprenu: Imagu, ke vi estas hipoteka kliento, kampulino. Vi venas al la fama Banko Flav. Enirante vi rimarkas, ke ĝi ampleksas nur unu etaĝon.

— Sed tio ne estas danĝera sekreto!

— Danĝero? La **dubo** estas la patrino de la danĝeroj. Vi sonorigas, kiel tabuleto indikas, vin akceptas kontoristino. En la vestiblo vi gapas momenteton: multaj porĵoj! Sur la plej granda pordo tabulo: Kas-kontoro. Tiu pordo estas vere miriga.

— Kiel pordo povas esti tiel miriga? Ĉu antikva?

— Ne. Sed ĝi efektive gvidas al la kas-ĉambro.

— Mi ne komprenas.

— Ĉar vi estas kampulino... malsperta.

## Reire al Julio Verne

En la unua n-ro de monata revuo „L' Arché” (l' arkeo) aperinta dum februaro 1944 en Alĝero, ĉe paĝo 85 Bertrando de la Salle esprimas tiun opinion:

„Dum la 20-a jarcento Fileas Fogg ne plu estus versaĵna. Supozante ke la speco de la riĉaj k ekstravagancaj nobeloj ne tute malaperis, ĉu la veto de Fileas Fogg ankoraŭ koncernus daŭron de la vojaĝo ĉirkaŭ la mondo?

„Ĉu ĝi ne rilatus pli ĝuste la necesan tempon por akiri la postulatajn legitimaĵojn? La titolo de la verko\*) iĝus io kiel: la ĉirkaŭrado de la mondo dum okdek ok tagoj. Tio estas okdek tagoj por akiri la dokumentojn, la pasportojn k vizojn, por obei al la doganaj, policaj, higienaj reguloj; por viziti ŝtataficiojn k al ili konigi la motivojn de l' vojaĝo, por havi permesojn monŝanĝi, ktp. — kaj poste ok tagoj por vojaĝi ĉirkaŭ la mondo.”

\*) La aŭtoro aludas la romanon de Julio Verne, franclingva literaturisto (1828-1905) „Le Tour du Monde en quatre-vingts jours” (la ĉirkaŭrado de l' mondo en okdek tagoj).

La personecon de Lanti vi retrovas en

## LETEROJ DE E. LANTI

Varia materialo kun soci-filozofia enhavo, priskriboj de moroj k landoj, ktp. Kun portreto. 280 paĝoj. — Prezo: 1.30 dol.

Ĉe SAT k la Libroservoj de LEA.

La apuda pordo indikas: Kirasdeponejo. Tiu pordo fermas koridoron rekte al la privata kuirejo de la bankiero.

— Vi babilas...

— Sed estas tiel! Malantaŭ la pordo de la indikita „Prokuristo” sidas sendenta maljunulo, kiu tuttage nur stampas leterojn. La „Konsilejo” estas laborĉambro de ekonomiaj ŝiprompitoj, mensmalfortuloj kaj friponoj. Inter ili ankaŭ por mi. Mi ne scias, al kiu kategorio mi apartenas. Sed eĉ pli interesa estas la pordo kun la tabulo: „Sekretario”. Tiu ĉi pordo konservas grandajn sekretojn. Ĝi gvidas rekte en la necesejon... Vi ridegas...

— Vi mensogas amuze. Mi ja povus malfermi la pordon kaj veni en la sekretejon. Kaj la tuta blufado estas senmaskigita.

— Stulta kampulino. Vi nenion povas malfermi. Oni konstante akompanas vin, ĝis vi forlasas la bankon. Vi povus veni al la sekretejo nur el la interna ĉambro, sed tiam vi ne povus eliri al la vestiblo, nur reen, ĉar la alia pordo de la sekretoj estas ŝlosita.

— Aĉa trompo! erupciis el la juna virino. Ŝia revkastelo pri certa kaj honesta ekzisto subite kolapsis.

— Trompo? Flav nur perdis la mezuron. Li ne alte taksas sian publikon. Sed li nur varbas klientojn laŭ kutima recepto. Li ŝajnigas havi grandan bankon, sed aliflanke li laboras por sia monprovizo. Falsaj tabuloj? Nia tuta vivo konsistas el tiaj. Ni konstante legas tabulon: „Ne mortigu” kaj ricevas medalon por militaj murdoj. Kaj tiel plu!

Liberpensuloj, Ateistoj, kiuj deziras konsistigi frakcion en SAT, por propagandi k apliki esp-on en la Lib. k Ateistaj medioj, konforme al la Regularo pri la funkciado de la SAT-frakcioj, bonv. interrilati kun K-do **Andreo Gay**, rue Lambert Dumesnil, Herblay, (S. & O.), Francio.

Por progresigaj kursoj tre taŭga estas

## UNUA LEGOLIBRO

de Bartelmes

104 paĝoj. Ilustrita. Prezo: 0.40 dol.

SAT-eldono

*Amo k malamo havas plej ofte saman fonton, saman kaŭzon. Sed amo estas balzamo k malamo acido, veneno. Kiam koro estas plena de amo, tiam ĉio estas facila; aferoj akiras specialan konsiston faciligan.*

★

*Laŭ mia opinio, la moderna ŝtato estas nur ia perfektigo de la malnovaj vojrobistoj — ĝi postulas vian monon KAJ vian vivon.*

Rikardo Aldington

(„Ĉiuj homoj estu malamikoj”)

★

*Homo havos mallaŭdan noton sur la registro de sia vivo, en la Tago de la Juĝado, pro ĉio, kion li ekvidis per siaj okuloj kaj rifuzis ĝuadi.*

Rabeno Areka

(en Talmudo, Kidduŝin 4.)

— Vi estas laca kaj amara.

— Ne tro, sed mi ne plu volas paradi per idealismo. Se sinjoro Flav ne faros ion rekte abomenan, la sekretaj pordoj ne interesos min. Sed mi provos defendi mian normalan labortagon kontraŭ la kolbasporcioj. Dektri horoj — iom tro longa labortago!

— Ho kiel malfrue estas! Vi ne havos tempon por dormi!

Dum la unua semajno Gabrielo laboris sola en ĉambreto. Li tamen vendis sian tagmeznan paŭzon por la viandpecoj. Por certigi al si la vesperon sinjoro Flav havis metodon. Kiam oni komencis streĉi siajn membrojn por fini la tagon, Flav senbrue envenis kaj komencis mallaŭtan, amikan diskuton kun iu. La ceteraj montris laŭdeve intereson kaj emfaze favoris al la sprita ĝeneraldirektoro.

— Ni bezonas perfektan propagandaparaton, li konkludis ĉi vespere. Ĉiu nia paŝo devas esti perfekte administrata. Ni devas varbi ĉiun unuopon vilaĝanon al la banko. Administristi! — li diris ankoraŭfoje, kaj nun lia voĉo transiris en la kotonan falseton, sur liaj vakskoloraj vangoj ekbrulis ruĝaj makuloj, sed la tuta vizaĝo restis pupeca: ankaŭ la senesprimaj okuloj nur globiĝis.

— Oni ne povas administristi la hazardon — diris neatendite Gabrielo... Per tio finigis la vespero. Sed estis jam la naŭa.

Ĝis nun Gabrielo faris nur kutiman skriblaboron, kaj pri la cirkonstancoj li decidis ne pensi. Li jam sciis, ke Flav ko-



## Junulara angulo

### Nia Junularrenkontiĝo en Ratingen

Kiel planite, tuj post la fino de la SAT-Kongreso ni veturis ĝis Ratingen kie okazis nia renkontiĝo. Tie ni esploris la lokojn, kiuj tre plaĉis al ni. Fakte la junulargastejo staras apud arbaro, ekster la urbo, sed tamen sufiĉe proksime de la banejo.

Proks. 50 gek-doj el Nederlando, Germanio k Francio ĉeestis. Kelkaj gek-doj, fine de la SAT-kongreso, aŭdante pri nia renkontiĝo, decidis akompani nin k restis kelkajn tagojn. Post la devigaj tedaj zorgoj pri pago, enskribiĝo... k-ino Weber k k-do Nussbaum legis laŭtvoĉe salutleterojn el diversaj junaj esperantistaj movadoj. Ni tiam kune organizis nian semajnon laŭ niaj deziroj. Ni elektis programon k ankaŭ decidis, ke ĉiumatene, tuj post la matenmanĝo ni rezervu dunhoron por kritiki ĉion, kio ne plaĉas al ni aŭ simple por fari proponon, modifi la programon...

Kutime, matene ni diskutis pri iu temo k posttagmeze ni ofte ekskursis, kolektis lignon por fari kampfajron, kantis, vizitis la ĉirkaŭaĵojn. Vespere ni ludis, popoldancis, denove kantis. Pluraj tre interesaj temoj estis pritraktitaj, ni citu: „la rajtoj de la junularo” — „kiel ni diskutu” — „virina influo en la Socio” — „por aŭ kontraŭ la mortpuno” — „ĉu ni fondu unuigitan

Eŭropon”. Multaj aliaj diskutoj okazis en amikecaj rondetoj.

Kiam la suno brilis, ni vizitis la banejon. Ankaŭ ni ekskursis al la „Blua Lago”, kiu aspektas absolute „verda”. Alian tagon, ni vizitis liberaeran teatraĵon: „Vilhelmo Tell” apud la blu-verda lago; pro tio ke la aktoroj parolis germanlingve, bonkoraj germanaj gek-doj tradukis esperante malgraŭ la protestoj de la najbaroj, kiuj plendis pri la bruo!

Ni okazigis tuttagan ekskurson tra la arbaro, kie la scivolemaj sciuroj observas la promenantojn. Sed, malfeliĉe, tro rapide forpasis la semajno. Jaŭde vespere festo estis organizita, k ni ĉiuj multe ĝojis pri tiu „multkolora vespero”. Vendrede vespere ni emocie kune kantis la „adiaŭan kanton” k tiel finiĝis nia renkontiĝo, ĉar la morgaŭan tagon ni disiĝis.

Loĝante en granda, tre vizitata junulargastejo, ni povis propagandi por esperanto k efektive montri, ke pere de tiu lingvo ni tre bone interkompreniĝas. Multaj germanaj gastejanoj petis informojn kun intenco lerni. Multajn adresojn ni interŝanĝis, multajn fotojn ni kaptis, kantojn ni lernis, neforgeseblajn memorarojn ni kunportis.

Ni nur bedaŭras la mallongecon de tiu sennacieca junular-renkontiĝo.

BRASIKETO.

*La kredoj faras la historion, precipe kiam ili estas malpravaj. Ĝuste por eraroj la homoj plej noble mortis.*

Will Durant (*The Age of Faith*, p. 458)

## Memornoto

*Liberpensuloj atentu!* Okaze de la Jusa Konferenco de Mond-Unio de Liberpensuloj en Bruselo la konferencanoj parte esprimis grandan malkontenton pri tio, ke la ĉefaj paroloj k prelegoj okazis franclingve, ekz. la redaktoro de l' angla „The Freethinker”, k-do F. A. Ridley, kies adreso estas: 41 Grays Inn Road, London W.C. 1. Tiu klerulo simpatias nian celon; K-do Edgecombe, kiu propagandis al li pri esp-o, petas, ke ankaŭ aliaj k-doj skribu al tiu influhava persono por rememorigi lin, ke la esperantistoj solvis la lingvan problemon.

„The Freethinker” (Londono), 21.9., entenas tradukon de l' artikolo de k-do Marso en „Sulo” (marto 1952) pri la Morta Maro.

La 30-a Kongreso de l' Monda Unio de Liberpensuloj en Bruselo (22.-26. aŭg.) akceptis jenan rezolucion:

„La Kongreso konsentas, ke universala lingvo kiel Esperanto povas faciligi internaciajn rilatojn k interkomprenon.”

Kelkaj geesperantistoj partoprenis en federalista manifestacio, kiu dum julio okazis ĉe landlimo ital-aŭstra, ĉe la trapasejo de l' Krecia Monto (germ. Ploencken), interalie la estraro de l' Udine-a esp. grupo.

„The Socialist Leader”, organo de brita ILP (Sendependa Laborista Partio) daŭre publikigas ĉiusemajnan rubrikon en esperanto. Legantoj de „Sulo” petu provnumeron kontraŭ respondkupono (se eblas). Adreso: 318 Regents Park Road, London N. 3.

Gazetoj el Gvatemalio raportis kun multaj fotoj pri *Ekspozicio de Infandeseĝoj* en la ĉefurbo de tiu ŝtato, al kiu kontribuis esperantistoj en la unua vico. Ankaŭ pri inaŭguro de Esp. kurso aperis artikolo kun ilustr.

F. Szilágyi

## La sekreto de la banko

— Finfine! Laboro en la hipoteka branĉo! Ne malbona tagsalajro. Bankiero Flav... jes... — li respondis al sia edzino dum manlavado. — Li estas ĝentila vangbarbulo, kopio de anglaj monlordoj. Li rigardas en la nenion kaj rimarkas ĉion.

Kelkajn jarojn post la unua mondmilito en militperdinta lando oni devis konsideri laboron en sia propra fako kiel loterian gajnon; por Gabrielo ĝi estis eĉ pli, vera premio. Dum longa tempo li estis malsana, poste senlabora. Sed ili nun satiĝos kaj la zorgoj ĉesos.

Sur la fasado de la granda ludomo fieris giganta abelujo kun literkolosoj: Familia Banko, Flav. La banko tamen okupis nur relative malgrandan parton de la domo. Por kunligi la kontraston inter la ekstera ŝajno kaj la interna fakto, amaso da tabuloj, vojmontriloj substrekis, ke la banko, trovebla en la dua etaĝo, estas grava institucio. Apud la pordo marmortabulo klarigis pri la sekcioj de la banko kaj tabuleto indikis: „Ĉi tie sonorigu!” Gabrielo akceptis senkritike tiun ĉi suspektindan zorgemon. Li renkontis la bankieron ĝis nun nur en lia privata loĝejo. Nun li venis la unuan fojon al sia laborejo. Li sciis, ke la banko proprasence ne estas banko, nur peranto de hipotekoj, terkreditnegocoj. Ĝi peris la kreditpetojn kaj dokumentojn de bienetuloj al la granda hipoteka banko, kontraŭ kelkaj procentoj el la decidita

pruntsumo pro la servoj. Gabrielo estis feliĉa, ĉar la servoj de la banko, eĉ se ne ĉiam necesaj, donos al li panon.

Palvizaĝa, juna kontoristino aperis post la sonorigo, la sekvan matenon:

— Mi scias pri vi. Mia nomo estas Marta Formik. Bonvenon!

Post saluto al ĝeneraldirektoro Flav, al kiu Marta Formik gvidis lin, Gabrielo interkonigiĝis kun la fratino de la bankiero. Ŝi estis la kasistino de la entrepreno. Ŝia volumeno estis ege ampleksa kaj ŝiaj astronomie ŝvelaj konturoj kaŭzis angoron al la rigardanto. Ŝiaj lakonaj komandotonoj, kvazaŭ kanonbruo, tremigis la tutan bankon. Flav mem parolis mallaŭte kaj senpasie, escepte okazojn, kiam emfazis erarigis lian voĉon en falseton altan. En la ombro de la kolosa kasistino gaje ruĝis granda nazo, tiu de ĉefrevizoro Feld, kiun ŝi prezentis al Gabrielo.

— Diru al mi nur, Tomaso, instigis la ĉefrevizoro Gabrielon. Kial du bovoj en la sama stalo titolus unu la alian?

— Vinbarelo! Se vi foje ne trinkus... diris la kasistino.

— Tiam vi certe ne vidus min ĉi tie.

— Ni ne maldungas lin pro kompatio — diris la kasistino, dum ŝi kun la forto de naturkatastrofo ŝovis rapide Gabrielon en la alian ĉambron. — Li havas nekuracblan edzinon kaj infanamason.

Feld efektive estis bonega matematikisto kaj malfeliĉulo. En la alkoholo li vidis sian solan medikamenton. Post la perdo de sia antaŭa posteno ĉi tie li sidis firme. Oni ne kuraĝis maldungi lin. „Li scias tro

multe”, oni diris kaj toleris, eĉ akcelis per subaĉetoj liajn alkoholekscesojn. Li timis neniu, eĉ ne la kolosan kasistinon.

Escepte la stenotipistinon Marta kaj la kontorestro, ĉiuj aliaj estis periferiuloj de la socio. Marta estis eta filistrino, kiu pale floris en la marĉo de la banko. Lia onklo, Piro, la kontorestro, kun siaj najlosimilaj haroj kaj hajlantaj mallaŭdoj en stranga naztono, rememorigis fremdlegiajn serĝentojn. Li estis firma pilastro en la banko. Laŭ si mem tre honeste li prizorgis sian naturan vivtaskon. La ceteraj ekspertoj, konsilantoj ktp. — ĉar neniu estis sentitola — estis mizeruloj. Inter ili estis duonidiota, malriĉiĝinta, maljuna aristokrato kun grandioza nomo kaj juna, aroganta ekskomizo, kies persvada talento ekfloris ĉi tie. Lia vojo al la karceroj jam nun estis klare difinita; tie estis ĉ. 30-jara, stulta kaj diboĉema „agronomo”, kiu komencis flirton kun la tria virino de la banko: kun sinjorino multe spertinta, ne juna, bonkora kaj komprenema. Ilia amo floris sub oficiale bendo de la banko. Kelkaj „konsilantoj” plej ofte laboris ekstere, t.e. ili semis fabelojn en la vilaĝoj pri la unika potenco de la Banko Flav: „Bone komprenu, amiko,” ili diris al kampulo babilema, „la granda stacidomo de la ĉefurbo tial staras tie, kie ĝi staras, ĉar oni konstruis ĝin ĝuste tie pro la proksimo de nia banko, pro ĝia granda trafiko.” La semo falis kaj la famo kreskis.

— Terure malfrue! — akceptis la edzineto Gabrielon dum la vespero post la la-